# *Reagas ?inio al usona kampanjo per apliko de reciprokaj limigoj kontra? amaskomunikiloj*



Pekino, mar 18 (RHK) La ministerio pri eksteraj rilatoj de ?inio diskonigis komunikon pri regularo kontra? la amaskomunikiloj kaj ?urnalistoj usonaj laborantaj en la azia lando, kio implicas tujan forigon de ?urnalistoj kun pendantaj renovigoj de akredita?oj.

La komuniko atentigas ke en la lastaj jaroj la usona registaro aprobis nepravigeblajn limigojn kontra? la ?inaj amaskomunikiloj kaj ties personaro en Usono, malhelpante ilian laboron kaj diskriminaciante ilin, raportisla televida ?eno Telesur.

Ekde decembro 2018 Usono ordonis al kelkaj ?inaj amaskomunikiloj registri?i kiel “eksterlandaj agentoj” kaj en februaro 2020 ili nomis 5 tiajn amaskomunikilojn kiel “eksterlandaj misioj” limigante la nombron da ?inaj civitanoj kiuj povas labori en tiuj amsamedioj.

Tiuj agoj kondukis al “forigo de ?inaj civitanoj de Usono” kaj la registaro de Xi Jinping rezervis al si la rajton “respondi”, kion ?inio ?us faras nun kun “tuja efiko”.

La ?inaj eldonoj de Voice of America, The New York Times, The Wall Street Journal, The Washington Post kaj Time, estas nun nomumitaj kiel “eksterlandaj misioj”, kaj sekve devas raporti skribe pri “sia personaro, financoj, operacioj kaj propra?oj”en ?inio.

Same, tiuj ?urnalistoj laborantaj en la ?ina eldono de The New York Times, Wall Street Journal kaj Washington Post, kies akredita?oj kaduki?as ?i-jare, estas petataj redoni ?in ene de la sekvaj 10 tagoj.

Ili ne plu rajtas labori en ?inio kiel ?urnalistoj, inkluzive en la administraj regionoj de Honkongo kaj Makao.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/217062-reagas-cinio-al-usona-kampanjo-per-apliko-de-reciprokaj-limigoj-kontrau-amaskomunikiloj

RADIO HABANA CUBA

**Radio Habana Cuba**